

Israela Esperantisto

(ANTAŬE "NIA LIGILO")

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO (E.L.I.)

Tel-Avivo 61390, Poŝtkesto 39004.
N-ro 51-Junio 1974

LA LANDA KONFERENCO DE E.L.I. kaj J.E.L.I

La 11-an de Aprilo 1974 (dum Pasko), okazis en Tel Avivo en salono de Bejt-Lesin la Landa Konferenco de ELI kaj JELI. Ĉeestis gesamideanoj de la tuta lando kaj gastoj. S-ano Ĉou-toff de kibuco "Maabarot" estis elektita kiel konferencestro kaj d-ro Beñar kiel sekretario.

La prezidanto A. Manor malfermis la konferencon honorigante la memoron de israelaj batalantoj kaj defendantoj patrujon dum la lasta milito. Li substrekis, ke ni denove konvinkigis, ke la batalo por enradikigi la ideon de internacia lingvo en internacian vivon, bezonas la samajn fortojn, kiel enradikigi la ideon de paco en la internaciajn rilatojn kaj vivon. Esperanto progresas paralele al ideo de paco en la mondo. Tio signifas, ke la fidelaj kaj aktivaj esperantistoj estis kaj estas tiuj, kiuj firme kredas kaj laboras por la pli bona mondo. Ni estas fieraj, ke disvastiĝo de Esperanto signifas disvastiĝon de paco kaj harmonia kunlaboro inter la homoj kaj popoloj.

La milito trarompis nian intensivan agadon por Esperanto en Israelo, sed ne ĉesigis ĝin.

Kion do ni faris dum la lasta jaro?

Nia revuo:

"Israela Esperantisto" aperis 4 foje. Ni ricevas multajn stimulaĵajn leterojn. Artikoloj de nia revuo estas represataj en diversaj Esperanto-gazetoj kaj eĉ en ne esperantaj.

La lasta numero de nia gazeto estis jubilea 50-a numero. En tiu ĉi okazo A. Manor kiel ĉefredaktoro esprimis sian omaĝon kaj dankon al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj klopodis, ke la enhavo de la revuo estu ĉiam interesa kaj alta. Ĝi estas nia esperanta tribuno per kiu ni prezentas enlande kaj eksterlande nian movadon, agadon kaj idealojn.

La akcepto ĉe la Ŝtatprezidento

Tiu ĉi grava evento tre influis nian movadon kaj tre vigligis nian laboron pro la morala apogo de la Ŝtatprezidento prof. E. Kacir.

Kursoj

En la lasta jaro estis gvidataj kursoj en diversaj lokoj en Israelo. En Tel-Avivo d-ro Maŝler gvidis 2 kursojn por komencantoj kaj unu kurson por progresantoj. En Ĥajfo gvidis kurson s-ano J. Tilleman. En Jerusalemo gvidis 2 kursojn inĝ. M. Savir. En Kfar Saba gvidis 2 kursojn s-ano J. Giladi. Korespondan kurson por la tuta lando gvidis s-anino A. Zduńska -Zajdmann. Si mem skribis la lernolibron. Partoprenis ĝin 80 gelnantoj. Parto de ili sukcese ĝin finis kaj jam aktivis en la movado. Grave estas substreki, ke la korespondan kurso atingas tiujn, kiu ne vivas en grandaj urboj.

Eldonaĵoj de ELI:

Korespondan kurso	de Anat Zduńska
Kantareto	de Anat Zduńska
Stencila terminaro	de Ŝmuil Mizeruĥa
Verkoj de H. Heine	" A. Holzhaus (monrimedoj de aŭtoro.)
Tria eldono de lernolibro	" Turno-Maŝler
Kantareto de	prof. W. Heimlich (monrimedoj de aŭtoro)
Nova adresaro de membroj	ELI kaj JELI.
Dua volumo de enciklopedia vortaro	de Ĥ. Rusak (monrimedoj de aŭtoro)

Informado:

Publikaj prelegoj: d-ro Maŝler prelegis en mezlernejo Nes Ciona, ĉeestis pli ol 100 aŭskultantoj.

Radio: Dufoje estis intervjuita d-ro Maŝler, Anat Zduńska, Ben David, Inon Mejiri.

Gazetaro: aperis artikoloj kaj sciigoj de A. Zduńska, J. Ŝemer, J. Wohlberg, J. Giladi en ĵurnaloj "Al Hamišmar", "Ujkelet", "Nowiny", "Dvar Hapoellet" kaj "Maariv".

Afiŝoj pri kursoj: 140 duoble grandaj afiŝoj pri kursoj estis pendigitaj sur stratoj en Tel Avivo.

Kluba vivo en Tel Avivo: Dum la lastaj monatoj prelegis en Tel Aviva klubo de ELI:

R. Alberg	- Israelano aŭ Judo
A. Ron	- Ombroj kaj lumoj de nia Ŝtato
K. Perlman	- 75 jaroj de kinematografio
H. Maŝler	- Ideo de internacia lingvo
A. Zduńska	- Raporto pri la 58-a UK
A. Manor	- La situacio post la balotoj
H. Maŝler	- Lumbildoj el Germanujo
A. Manor	- Politika trarigardo
J. Rabino	- Pezgardantoj
H. Maŝler	- Trograsiĝo
K. Perlman	- Vojaĝoj al la norda poluso

Kunsidoj: Ĉiumonate okazis kunsidoj de la estraro de ELI kaj JELI.

Salutoj: Post la inaŭgura parolado de prez. A. Manor salutis la konferencon la gastoj de Anglio kaj Sovetio. S-ano A. Ron prelegis pri Zamenhof kaj deklamis du poeziaĵojn de L.L. Zamenhof. S-ano J. Ben Alter rakontis tre interesajn epizodojn de sia esperanta vivo.

Raportoj:

Pri sia agado raportis detale la estraranoj. La raportoj montris la laboron de CK de ELI kaj JELI, kiun ili fidele plenumis malgraŭ la malfacilaĵoj pro la terura milito. S-ano H. Haroun raportis pri la kasstato kaj pri ĉiuj gravaj en- kaj elspezoj. La jaro ne finiĝis per deficino malgraŭ elspezoj pro eldonaĵoj kaj por propagando. Pli grandaj enspezoj venis de kursoj de H. Maŝler kaj A. Zduńska. 1000 lirojn testamentis forpasinta s-ano Jaakov Gureviĉ. Senĉesan profiton donas forvendado de la lernolibro Turno-Maŝler. De forvenditaj verkoj de Heine donacitaj de s-ano Holzhaus al d-ro Maŝler kaso ricevis 225 lirojn. Testamento Engelŝer, pri kiu raportis s-ano N. Drezner, donis ĉi jare 1650 lirojn.

S-ano J. Tilleman raportis pri agado de JELI. Li modeste esprimis sian malkontenton pri ĝia agado. La raporto tamen montris, ke ĝi estis tre kontentiga. La junularo kunvenas ĉiumonate en alia loko en nia lando. Ilia nombro kreskis kaj kelkaj novaj jam aktivis. S-anino A. Zduńska gvidis tre sukcese korespondan kurson kaj reprezentis JELI dum la kongreso de TEJO en Sarajevo kaj en UK en Beogrado. S-ano Slain sukcesis per kurtonda radio kontaktiĝi kun eksterlandaj samideanoj. S-ano J. Giladi raportis pri sia laboro kiel sekretario.

La diskuton partoprenis s-anoj Alberg, Ben Alter, Tilleman kaj Giladi.

Elektoj: Estis elektita la sama estraro kun aldono de s-anino Ester Haroun.

En la redaktan komitaton estis elektitaj: A. Manor, D. Wunderbaum kaj J. Giladi.

En kontrolan komisionon oni elektis N. Israeli kaj A. Kuperman.

La ges-anoj disiĝis esperante, ke venonta jaro estos pli fruktodona.

Protokolis d-ro J. Beĥar.

ZAMENHOF ESTIS HEBREO.

Jen pruvoj:

1. Naskiĝregistro por naskiĝintaj hebreoj en la jaro 1859, skribita en la juda kaj rusa lingvoj. n-ro 47. Gepatroj mordka, filo de Faĵvel, Zamenhof, Liba filino Ŝolem, Sofer, filo Lejzer; subskribis rabeno;
2. Atesto de 10.7.1878 de białystoka komunuma rabeno de la urbo Białystok kun la distrikto pri tio, ke de laŭleĝaj gedzoj Mark Fabianoviĉ Zamenhof kaj Liba Ŝolemovna la 3-an de decembro 1859 naskiĝis en la urbo Białystok la filo, al kiu estis donita nomo: "Lazar". Tiu ĉi naskiĝo estis enskribita por registro de la hebreoj, naskiĝintaj en la urbo Białystok en tiu 1859 jaro sub n-ro 47; subskribis rabeno M. Markus
3. Atesto pri matureco de 15- de junio 1879; tiu ĉi estas donita al Lazaro Zamenhof, de la hebrea konfeso, filo de oficisto, naskiĝinta en la u. Białystok, gubernio Grodno, la 3-an de decembro de la 1859 jaro, ... pri tio;
4. Atesto de 30.4.1880 sub n-ro 437 de la universitato en Moskvo, donita al Lazar Markoviĉ Zamenhof, filo de oficisto IX-klasa, de la juda konfeso;
5. la 9.8.1887 Zamenhof edziĝis kun hebreino Klara Zilbernik;
6. Letero de 19 (31) VII.1889 de Zamenhof al V. Majnov: "respondante vian demandon pri mia religio mi devas sciigi vin, ke mi estas nek katoliko, nek luterano, - mi estas hebreo;
7. En la broŝuro "Hilelismo", eldonita en la rusa lingvo en aprilo 1901, Zamenhof skribas sur p. 3: "Legantoj hebreoj! En la nomo de estonto de dekmiliona amaso de niaj fratoj, ĉie pelataj kaj malestimataj, suferantaj jam tiel multajn jarcentojn kaj ŝajne kondamnitaj ankoraŭ al la plua suferoj sen antaŭvidata fino"; sur la paĝo 27: "Ni hebreoj, seniluziĝis jam en multaj eraraj esperoj, kaj nun forlogiĝi per nova iluzio, promesanta al ni la solvon de la hebrea demando per vojo de foriĝo de ia nenion signifanta flanka aperaĵo anstataŭ baza kaŭzo de niaj suferoj - al ni estas jam ne pardoneble;"
8. Letero de 21.2.1905 al Michaux-Zamenhof skribas: "Mi estas hebreo kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj in-

ternaj kaj eksteraj - ĉiuj estas sendisige ligitaj kun ĉi mia hebreeco! En la letero li naŭfoje diras: "Mi estas hebreo" kaj sepfoje: "Mia hebreeco";

9. Letero de 15.10.1905 de E. Javal al Zamenhof: "Mi legis pli ol sepcent gazetartikolojn rilatajn al Esperanto, aperintajn ekde Bulonjo. Unu sola diris, ke Doktoro Zamenhof estas judo. Ni bezonas admirindan disciplinon por kaŝi al

la publiko vian originon";

10. Poŝtkarto de 28.2.1906 al Th. Ĉejka: "Mi naskiĝis en Białystok, 3/15 XII 1859; nacio-Ruslanda hebreo;

11. Letero de 3.7.09 al C. Bourlet: "Hispanujo estas tre fervore katolika lando kaj mi estas... hebreo. Tial mi timas, ke grandaj honoroj, farataj al hebreo, faros en tiu lando malbonan impreson";

12. Letero de 14.2.1912 al la Loka Kongresa Komitato: "Estas vero, ke mi al neniu faris ian malbonon; sed mi estas hebreo kaj naskiĝis en Litovujo... ne nomu min polo, por ke oni ne diru, ke mi por akcepti honorojn - metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas... Laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento hebrea";

13. letero de 4.5.1914 al Bilingbroke Mudie: "Mi petas vin, ne forgesu averti la Biblian Societon, ke mi estas hebreo";

14. Zamenhof estis enterigita en la juda tombejo apud Okopova strato en Varsovio; la diservon (16.4.1917) faris rabeno S. Poznański.

Adolf Holzhaus (USONO)

ALEKSANDER ZILBERNIK-UNUA MECENATO DE ESPERANTO

L. Zamenhof finis la kreadon de Esperanto en 1885 kaj dum 2 jaroj vane serĉis eldoniston. Neniu volis riski la monon por eldoni la unuajn malgrandajn broŝuretojn pri Esperanto en la rusa, pola, franca, germana, angla lingvoj. Tio ĉi estis farita dank'al la helpo de Aleksander Zilbernik, la bopatro de Zamenhof, kiu donis la necesan monon. Poste li donis monon por la propagando de l'Esperanto kaj dum 15 jaroj vivtenis Zamenhof, ĉar liaj profesiaj enspezoj estis tiel malgrandaj, ke ili kovris nur parton de la plej modestaj elspezoj. A. Zilbernik subtenadis lin ne sole materiale, sed ankaŭ morale: tuj post la apero de Esperanto (26. julio 1887) li ellernis ĝin perfekte, malgraŭ sia aĝo; li konsoladis ĉiam sian bofilon, kiam la esperoj de tiu ĉi komencis malfortiĝadi; li havis ĉiam grandan amon kaj intereson por la afero kaj la lastaj libroj kaj gazetoj, kiuj troviĝis sur lia skribotablo antaŭ la morto estis esperantaj.

En Kovno Zilbernik en kompanio kun alia persono havis malgradan fabrikon en kiu li laboris ĝis la 74-a jaro de sia vivo. Li havis naŭ gefilojn. Li mortis post kelkaj

monatoj da suferado en Varsovio en la loĝejo de unu el siaj filinoj (Levite) la 25-an de marto 1906.

Al A. Zilbernik, unua mecenato de Esperanto, ni esperantistoj tre multe ŝuldas, ke Esperanto aperis en la mondo, ke ĝi povis trapasi la plej malfacilajn unuajn jarojn de sia ekzisto.

Eterna ama memoro restu por lia nomo!

Adolf Holzhaus

ESPERANTO KAJ LA INTERNACIAJ KONGRESOJ

La historio de la internaciaj kongresoj komenciĝis en la jaro 1681 per la internacia medicinista kongreso en Romo. Ek de la jaro 1900 la nombro de internaciaj kongresoj ĉiujare kreskas, de 100 kongresoj en tiu jaro ĝis proksimume 3000 dum la lastaj jaroj.

En la jaro 1972 okazis en Eŭropo 68% de ĉiuj kongresoj, 19% en Ameriko, 7,2% en Azio, 3,2% en Afriko kaj 2,6% en Aŭstralio. La plej grandan nombron de kongresoj gastigis Pariso, Londono, Genevo, Bruselo, Vieno kaj Romo. Plej granda nombro de kongresoj okazas en Marto kaj Septembro.

En la lasta jaro 2.000.000 homoj partoprenis la kongresojn al ili 3/4 venis de eksterlando.

Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (UIA) sciigis, ke en la kongresoj estas uzataj 19 lingvoj. La plej uzata estas la angla lingvo. Inter 315 kongresoj uzis ĝin 298, francan 266, germanan 157, hispanan 61, rusan 16, italan 13, portugalan 9, svedan 8, esperanton 6.

Substrekinde estas, ke nur esperantaj kongresoj laboris sen tradukistoj kaj interpretistoj.

La lingva ĥaoso kaŭzas inter alie grandajn monelspezojn por tradukado kaj presado de la tradukita materialo.

Esperanto pruvis sian taŭgecon por la internaciaj kongresoj kaj ĝis nun ne troviĝas iu lingvo, kiu povas konkuri kun la avantaĝoj de senpera kaj seninterpretista uzo de Esperanto.

Josef Šemer

LA ARABA IMPERIALISMO

Prezidento de Ugando Idi Amin plendis antaŭ ne longe, ke arabaj ŝtatoj, altigante la prezon de nafto metis sufokantan pendŝnuron sur la kolon de la evoluantaj ŝtatoj. Antaŭe, li diris, israelaj specialistoj helpis progresigi Ugandon. Anstataŭ plenigi la malplenan lokon post foriro de israelanoj de Ugando per arabaj specialistoj, la naftoproduktantoj frapis la ugandan ekonomion per

kruta prezaltiĝo de la brulaĵo.

Altigi de la prezo de nafto de 3.65 dol. pro barelo ĝis 11.65 kaj iam ĝis 17 dol. pro barelo treege malhelpas al evoluantaj landoj, kiuj eĉ ne havas sufiĉe da nutraĵo por sia loĝantaro.

Ŝtatoj kiel Hindujo, bangaladeŝo, Pakistano ne povas trovi monrimedojn por kovri la ĉiutagajn elspezojn por la brulaĵo necese bezonata. La plialtiĝo de nafto-prezo plialtigas elspezojn de tiuj landoj je 4-5 miliardoj da dolaroj dum la jaro. En Afriko la elspezoj pligrandiĝis je 600-800 milionoj da dolaroj. La aziaj kaj afrikaj ŝtatoj, kiuj interrompis siajn kontaktojn kun Israelo komencas jam senti la rezultojn de la politiko de arabaj ŝtatoj. Ĝi intencas povrigi kaj malfortigi la ŝtatojn batalantajn malfacile por sia pano kaj ekzisto.

Ekestis do nova formo de imperialismo de arabaj ŝtatoj, kiuj mem apartenas al la neevoluitaj ŝtatoj kaj enhavas ĝis 75% da analfabetoj, sed per helpo de mono ili superregas aliajn subevoluitajn ŝtatojn kaj malhelpas altigi ilian vivnivelon.

D.M.

LA MURDO DE INFANOJ

La infanoj de la lernejo je la nomo de Januŝ Korĉak en Kiriati-Ŝmone konis la faman edukiston kaj pedagogon nur kiel legendan rakonton. Ili ne imagis al si, ke iam venos al ilia domo murdistoj kun intenco fari samon, kion faris la hitleristoj al lernantoj de Korĉak.

Tiu lernejo eldonas gazeton, en kiu skribas lernantoj sub titolo: "Atentigo de Korĉak."

Post la milito estis la tuta gazeteto dediĉita al la mobilizado de la civitanoj kaj lernantoj por helpi niajn defendantojn. Unu okjara knabino skribis:

"Mi estas tre malgaja ĉar mi dormis en defendrifugejo kaj ne povis ĝui la sunlumon. Tiu ĉi tago estis tre bela. Mi tiel sopiris esti libera kaj lerni, ĉar mi ne havis ion por fari. Sidi la tutan tagon en rifugejo ne estas agrable. Kiam mi dormis nokte, mi ĉiam ploris sonĝante, ĉar mi sonĝis pri milito. Matene mi rigardis tra la fenestro kaj vidis nek katon nek hundon. Tiam mi komprenis kio signifas milito."

Tion skribis la okjara Ester Ŝitrit, kiu hazarde ne estis murdita, sukcese kaŝante sin en la ŝranko kun sia hundeto, kiam la teroristoj eniris ŝian hejmon kaj mortigis bestie ŝian patrinon, fratinon kaj du fratojn...

A.M.

LA "HOMAJ RAJTOJ" DE JUDOJ EN SIRIO

Du Judoj, kiuj sukcesis forkuri de Sirio al Londono rakontis pri la limigoj de la rajtoj de Judoj en sia "patrolando". Laŭ la rakonto Judoj ne havas rajton labori en bankoj kaj ne kiel ŝtato-ficistoj. Ili estas rajtigitaj servi kiel manlaboristoj ĉe islamanoj kaj kristanoj. Ili devas pagi specialan altan imposton por palestinanoj. Ili ne havas rajton esti ekster la domo post la naŭa vespere kaj antaŭ la sesa matene. Substrekinde estas, ke limigoj tiuj estas direktitaj kontraŭ "siriaj civitanoj".

Ili aldonis, ke se iu eksterlanda ĵurnalisto vizitas Sirion, la polico avertas Judojn ne rakonti pri la vera stato de Judoj tie.

INTERNACIA BABELTURO

La bejruta ĵurnalo skribas: "Dum renkontiĝo de prof. Kissinger kun siria ministro por eksterlandaj aferoj la lasta petis pardonon pro sia nesufiĉa kono de la angla lingvo." La homoj de lia generacio lernis ne anglan sed la francan lingvon. Prof. Kissinger demandis lin: "Kaj nun kiun lingvon vi lernas, ĉu rusan?" La respondo estis-jesa.

LA KVINA ĈEFMINISTRO DE ISRAELO IĤAK RABIN

Iĥak Rabin naskiĝis la 1.3.1922 en Jerusalemo. Lia patro venis al Israellando (Erec Israel) kun soldatoj de la Juda Legiono dum la unua mondmilito. Li lernis en terkulturadlernejo en Valo de Jizreel (proksime de Ĥajfo). Li estis mobilizita al defendorganizo (Hagana) de tiama Palestino kaj partoprenis multajn kampaniojn kontraŭ la malamika angla reĝimo. En la jaro 1948 dum la "Sendependencmilito", kiel regimentestro malfermis la vojon al sieĝita Jerusalemo.

Post la milito kiel vicŝtatestro partoprenis armistikonferencon en insulo Rodos (1949). En la jaro 1964 fariĝis ŝtatestro de la israela armeo (Cahal). Li gvidis la militon en la jaro 1967 ĝis ĝia brila venko. Li ricevis titolon de honora doktoro de filozofio en jerusalema universitato.

En la jaro 1968 fariĝis diplomato kaj estis sendita al Vaŝingtono kiel ambasadoro. Tie li restis 5 jarojn. Skribis pri li la usona vicministro por eksterlandaj aferoj d-ro J. Sisko: "Rabin distingiĝis per akra disputado, preciza kono de faktoj, brilis en iliaj analizoj kaj estis ĉiam konvinkiga".

Post lia reveno Israelon eniris registaron kiel ministro por laborfortoj. En Majo 1974 estis elektita kiel kvina ĉefministro en Israelo.

PUBLIKAJ LETEROJ

Al la redaktoro de Sennaciulo:

Estimata Redaktoro!

En la numero 3-a (826) Marto 1974 de Sennaciulo mi legis en la rubriko "Ĉies opinio", longan leteron de s-ro J.P. Marmon.

La redaktoro de Sennaciulo, oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda, avertas sur la unua paĝo, ke pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem.

Mi komprenas, ke la redaktoro ne respondecas pri la enhavo de la leteroj, kiujn li ricevas. La opinioj de ĉiuj homoj estas diskutablaj, sed mi ne certas, ĉu la ĉefredaktoro de la ĵurnalo devas laŭ la respondecado de la aŭtoro presigi ĉiujn mensogojn, kiuj la aŭtoro tradukis de iu orienteŭropa ĵurnalo. (Ĉu vi ankaŭ presigus je la respondecado de aŭtoro leterojn de hitleristoj kaj aliaj faŝistoj?). La aŭtoro amasigis tiel multe da mensogoj, ke mi ne scipovas ilin ĝustigi. Mi permesas al mi fari nur unu rimarkon: La nomo de ministro (ne generalo) estas Moŝe Dajan ne Moĵŝe. Tio ĉi ne estas eraro. Moĵŝe estas moknomo por Judoj en iu orienteŭropa lando (de kiu mi devenas). Mi ĝis nun ne povas forgesi okazintaĵon de miaj junaj jaroj, kiam aro de junuloj jetis kontraŭ mi ŝtonojn kriante: "moĵŝe for al Palestino". Mi ne scias, ĉu moknomojn por Judoj presigas Sennaciulo ankaŭ je la respondecado de aŭtoro.

Mi tre bedaŭras, ke mi nun devas skribi tiun leteron. Mi forlasis s.n. landon por plu ne aŭdi "Moĵŝe for al Palestino" kaj mi sukcesis jam de longe ĝin ne aŭdi.

Ĝis mi ne trovis ĝin en la "sennacieca kaj esperanta" ĵurnalo. (Parenteze: ĉu la redaktoro de Sennaciulo presigus en sia ĵurnalo je la respondecado de la aŭtoro, ke iu aĉulo "Lajbuŝ" Zamenhof volis altrudi faŝisman, judan lingvon al mizeraj arabaj ŝejkoj?.)

d-ro Henryk (ne Moĵŝe) Maŝler

Estimata Redaktoro de Senaciulo.

Mi estas membro de kibuco dum multaj jaroj. Preskaŭ la tutan vivon mi travivis, kiel homo nek ekspluatata, nek ekspluatanta. Mi estas socialisto, kiu realigis siajn ideojn praktike. Mi supozas, ke tio donas al mi rajton senti min

proksima al Sennaciulo, kiu proklamas tiel belajn kaj altajn idealojn. Sed en sennacieca "ĝardeno" mi trovis laste /3-a numero/ kelkajn dolorigajn dornojn, kiuj trapikis mian koron kaj kiuj en formo de artikoloj de s-ro Marmon kaj vemo estas presitaj sen iu rimarko de la redakcio. Mi scias, ke en "Sennaciulo" skribas diversaj personoj, sed ekzistas morala limo, kiun oni ne devas trapasi. Mi ne scias devenon de la supremenciitaj sinjoroj, sed iliaj vortoj atestas, ke ili estas sataj de "nacieco kaj sendependeco". M. kaj V. faris nenian penon profundiĝi en la problemoj de la popolo "elektita per dioj" kaj ekstermata per homoj. Kiom da kompreno ili montras por Araboj? Kiel doloras iliajn korojn la suféroj kaj persekutoj de Araboj? Kiel cinike ili pretervidas la problemojn en arabaj landoj regataj per militestroj, diktatoroj, kie regas mezepokaj moraloj en formo de sangvenĝo, sklaveco, religia fanatikeco kaj popolgenocido.

Kial pretervidas la sinjoroj M. kaj V. la staton de Judoj en arabaj landoj? Kaj en Eŭropo? La historio de Judoj ne komenciĝis en la 20-a jarcento. Dum multaj centjaroj oni persekutis kaj mortigis ilin. Kiel rapide ili forgesis la tragikan kataklismon de Judoj dum la sovaĝa regno de Hiler? La lando kiun, vi nomas Palestino kaj ni Erec Israel (la lando de Israelidoj), ĝia memoro neniam estis forgesita de Judoj. Post ĉiu sangverŝado ĉe Judoj denove revekigis la sopiroj al sia malnova lando, kie oni esperis denove krei sian vivon sur la forta bazo enkadre de sociala, demokrata humanismo. Do, kiel vi vidas, du fortoj "puŝas" Judojn tien ĉi. La amo al la propra sendependa lando kaj la malamo de ĉirkaŭanta mondo.

Kiel socialisto mi komprenas, ke sen reciproka "bona volo" flanke de du nacioj ni povas nenion solvi. Ĝis nun Araboj volas nur murdi kaj heredi, dum Israelo volas justan solvon, kiu sekuru lian vivon kaj sendependecon.

La landon ni ne konkeris perforte, kiel vi asertas malbonvole... Siatempe rezoluciis UNO pri la juda ŝtato. Ĝi estis vere liliputa ŝtato, ricevante ĝin kun amo ni volis ensorbi. eĉ en tiuj malfavoraj kondiĉoj la restintajn Judojn post iliaj teruraj travivaĵoj, sed la arabaj ŝtatoj ĉirkaŭantaj Israelon milite volis bremsi la revenon de Judoj. Israelanoj kun siaj povraj tiam armiloj, sed kun forta volo travivi, repuŝis la lavengon de arabaj soldatoj kaj palestinajn amasojn. ni ne estas denaske herooj. Ni defendis nur nian liberecon kaj vivon. Eble, se ni malvenkus, s-ro M. kaj V. estus post nia morto plorantaj sur niaj tomboj kaj estus glorintaj nian heroecon, kiel faris la mondo post hitlerbuĉado kaj poste estus forgesintaj la tutan aferon.

Niaj bataloj kaj militoj ĉiam estis nur reago kontraŭ "herooj" bandit-bandoj, mortigintaj virinojn, infanojn kaj maljunulojn en ombro de nokto, aŭ kun arabaj armeoj pretaj trapasi niajn limojn.

Ni estas malgranda nacio kaj ni volas solvi niajn problemojn je reciproka interkompreno. Ni etendas nian manon al la araba popolo en paco. Se ĝi lin ne akceptos ni ne havas alian eliron krom esti pretaj rebati.

S-ro M., vi estas tiel fidela al SAT ideoj. Mi permesas al mi konsili vin: bonvolu komenci efektiviĝi tiujn ideojn en via lando. Forprenu la ŝtatlimajn ŝtonojn, enkonduku la definitivan justecon, ĝeneraligu inter samnacionoj Esperanton. Post viaj atingajoj ni certe sekvos vian bonan volon. Kaj vi s-ro V. Se vi bazigas viajn akuzojn je malnovaj gazetoj, vi povas ankaŭ trovi sciigojn pri sovaĝaj atakoj de teroristoj kontraŭ judaj vilaĝoj, pri amasmurdado Judojn en Hebrono, Jafo kaj en aliaj lokoj. Ne pensu, ke tiuj okazintaĵoj povas trapasi senpune...

Fisel Kafri

Rimarko de la redakcio: La supran leteron ni ricevis antaŭ la amasbuĉado de virinoj kaj infanoj en Kiriat Šmone kaj en urbeto Maalot. En Maalot estis murditaj 20 infanoj kaj 70 estis vunditaj kaj tio ĉi okazis, post kiam Israelo promesis retiriĝi de okupitaj terenoj kaj jam fordonis parton de ili al Egiptio.

RECENZO

LA RAJDADO KIEL MODERNA TERAPIO DE LA MEDICINO

Eberhard Fellmer; sendis s-anino Annelise Bepperling el Hamburgo. 20 paĝoj 21x28. stencilita. Ĝi priskribas kuracadon de malsanuloj post miokardinfarkto kaj kaj de militaj vunditoj.

Si proponis traduki la manuskripton hebrean por helpi niajn vunditojn dum la lasta milito.

La manuskripto pritraktas kuracadon per ĉevalrajdado. Ĝi certe estas interesa ideo, kiun oni devas plue pristudi en iu medicina centro Ĝi bedaŭrinde ne povas esti farita en Israelo pro manko de la ĉevaloj kaj la specialistoj por rajdado en Israelo.

Prelego pri la sama temo en UK en Vieno estis akompanata per interesa kolora filmo, kiu donis fortan impreson ankaŭ por ne fakuloj en medicino.

H.M.

ISRAELAJ VIDINDAĴOJ

La malnova urbo en Jerusalemo

La malnova urbo en Jerusalemo estas neforgesebla vidindaĵo por ĉiuj turistoj. Ĝi enhavas sanktajn lokojn de 3 religioj: kristana, juda kaj islama. Sed ankaŭ anoj de aliaj religioj kaj eĉ ne religiaj homoj povas ĝui tiujn vidindaĵojn. La vizitanto devas dediĉi unu tagon por tiu malgranda laŭ la areo loko por nur surface ĝin pririgardi kaj ekkoni.

La malnova urbo estas ĉirkaŭata de muroj 4 km longajn. La muroj estis konstruitaj antaŭ 350 jaroj de Turkoj kaj estas tre pitoreskaj kaj en sia tuto vidindaj. Nur la parto nomata "Turo de Davido" estas konstruita en la 12-a jarcento de Mamelukoj, kiuj tiam regis la landon. En la malnova urbo pro la manko de la loko stratetoj estas tre mallargaj kaj mankas vastaj placoj. La urba trafiko tie ne ekzistas. La aŭtobusoj atingas la murojn ekstere. Ĝi faras impreson, ke ni subite forlasis la 20-an jarcenton kaj troviĝas ree en mezepoka urbo. La varoj estas distribuataj per azenoj aŭ duradaj veturiloj. Multego da la orientaj vendejetoj permesas aĉeti interesajn donacetojn. Atenton nur pri manĝaĵo, ĝi estas pli sendanĝera ekster la muroj malgraŭ la ekstera pureco de la stratoj.

La malnova urbo havas 4 diversajn partojn. Araban, (islaman kaj kristanan), la judan kaj la armenan. La juda parto tute detruita dum jordania okupado, estas nun en stato de rekonstruado laŭ la originala stilo, sed adaptita interne al la hodiaŭa uzo. La stratoj tratranĉas urbon kiel regula reto, la ĉefan straton oni povas ekkoni per la pli densa vizitataro, sed ne pro larĝeco aŭ pro imponaj konstruaĵoj. La domoj estas malgrandaj, inter ili distingiĝas kontraste preĝejoj kaj moskeoj. 34 turoj pikas la ĉielon kaj ĉiu de ili havas sian historion kaj ĉiu de ili altiras multajn pilgrimojn.

La turistoj en sia plimulto ne neglektas trapasi la mondkonatan "via Dolorosa" -Doloriga Vojo, kiun antaŭ 1942 jaroj trapasis Jesuo Kristo kun la kruco surdorse. Trapasante la straton ni renkontas t.n. "Staciojn de Suferoj" priskribitajn en Evangelio. En ĉiu de ili estas gvidantoj, kiuj klarigas la signifon de la loko en diversaj lingvoj.

La plej grava preĝejo estas tiu, kie troviĝas la tombo de Kristo. Ĉe la muroj sed ekstere troviĝas la grava Preĝejo de Ekdormiĝo, kie mortis Mario patrino de Jesuo.

La plej bela vidindaĵo estas 2 sanktaj por islamanoj moskeoj sur la monteto Moria. El Akca kaj Omar. Arkitekturo de Omar estas pli bela, ĝi estas konstruita sur la roko kie laŭ legendo Abrahamo volis al Dio oferi sian filon Iĉĉak. Laŭ la islama religio li volis oferi filon Iŝmael. Moskeo El Akca

estas pli sankta por islamanoj. De tiu loko laŭ legendo iam Mohamedo leviĝis kaj forflugis al mekko.

La sankta loko de Judoj estas mondkonata "Muro de Ploro", en Israelo nomata Okcidenta Muro. Ĝi estas restaĵo de la muro de la konata de biblio sanktejo detruita de Romioj 70 jaroj p.K. La malsupra parto estas restaĵo de la salomona templo, la supra estis konstruita de la reĝo Herodo. Antaŭ ĝi oni ĉiam povas trovi preĝantajn Judojn de la tuta mondo, kiuj venas tien preĝi kaj plori. La eniro al la Muro estas dividita duone por viroj, duone por virinoj.

Maldekstre de la Muro estas interesaj ekskavaĵoj de antikvaj domoj. Tie oni ankaŭ komencis fosi por trovi la malsupron de la fundamento de la muro. Ĝi troviĝas dek metrojn sub la placo antaŭ la muro.

d-ro H. Maŝler

POEZIAĴOJ

Esperanto la lingvo por ni

Tre granda ja estas la mondo
diversaj la lingvoj en ĝi,
Sed ankaŭ tre granda la rondo
De nia esperanto-famili`.

Esperanto estas la lingvo por ni.

Ĉu vi venas el Azio, Afriko,
el Eŭropo, aŭ el Australi`,
el norda, aŭ suda Ameriko,
la manon ni etendas al vi.

Esperanto estas la lingvo por ni.

Kaj kantas la kanton ni kune
per ĝojo kaj per harmoni`.
Somere, ĉu vintre, aŭtune-
Esperanto la lingvo por ni.

Esperanto estas la lingvo por ni.

J. Giladi

La belaj revoj

Kantu pri belaj revoj
Ĉar revanto estas mi.
Kantu kune, kantu laŭte,
gaje sonu la melodi`.

Ĉar mi kredas pri l'estonto,
Venos baldaŭ feliĉa tag`.
La militoj tute ĉesos,
gaje flirtos ĉiu flag`.

La malsato kaj mizero
malaperos de la ter`.
De amo frata kaj espero
aŭdiĝos kantoj en la aer`.

14

Ankaŭ la popolo juda
ree venos al sia land`,
floros kreskos ĝi denove,
perlo ĉe la meztera rand`.

Novan kanton la poeto
tiam kantos pri paca glor`.
De mia tombo vi florojn prenos,
bukedon plekti por lia honor`.

Ŝ. Ĉerniĥovski (1875-1943)

Esperantigis: J. Giladi.

JAPANAJ SEKTOJ DE LA JUDA DEVENO

En Japanio aperis libro (en angla lingvo) de Prof. Ikuro Teshima "The ancient Jewish diaspora. The tribe of Ada" Tokio.

La aŭtoro de tiu verko estas fondinto de la Makoja sekto kaj ĝia gvidanto. Li argumentas, ke la Ada tribo, kiu vivis en multaj regionoj de Japanio, estis la plej forta el ĉiuj aliaj triboj, kiuj enmigris Japanion. Multaj lokoj en Japanio havas nomon "Uata", "Hatano", "Japada", "Jahata" k.s. Ŝajnas, ke la unuaj de tiu tribo venis Japanion kelkcent jarojn antaŭ la Kristo.

D-ro Juŝiro Saki malkovris sur malgranda insulo Ikoŝima en la jaro 1907 tombon de ĉefo de la Ata tribo kaj sanktejon nomatan "Osaka ĝinga", kio signifas -"Sanktejo de la reĝo David". Li opinias, ke la vortoj "Johata" aŭ "Jahada" estis antaŭe "Jahuda". La vortoj Jehuda kaj aliaj hebreaj vortoj en la libro estas skribitaj per hebreaj literoj. En unu japana kanto aperas frazo "An Jala Jah", kiu entute estas nekomprenebla en japana lingvo. La esploranto d-ro Kavamura trovis en tiuj vortoj (kaj aliaj similecon al hebreaj vortoj "ani ahalel Jah" (mi laŭdos dion). La aŭtoro rakontas, ke li ĉeestis festivalon apud sankta loko en la distrikto Kioŝo en urbo Jatoŝiro kaj tie li aŭdis en publikaj kantoj vortojn: "Haleluja", "Jahuhu", ankaŭ tiuj vortoj devenas de la hebrea lingvo, same kiel la vortoj en aliaj kantoj "Jehuda", "Jah", "Moŝe" kaj aliaj. Li rakontas poste pri 3 monumentoj malkovritaj en Ĉinio. La unua estis starigita en la jaro 1512 kaj sur ĝi estas surskribo atestanta, ke dum la regado de la "Han" dinastio (202-221 a.K.) venis Judoj al Ĉinio. Sur la dua monumento de la jaro 1663 surskribo atestas, ke ili venis tien en la jaro 225 a.K. La aŭtoro supozas, ke Ata tribo devenas de la judaj enmigrintoj al Ĉinio, kiuj venis al Japanio komence de la unua jarcento kaj ke la urbo Kai-pangfu ĉe la fino de la silkvojo estis la celo de la ju-

daj enmigrintoj.

15

Alia surskribo de la jaro 1489 indikas, ke en tiu urbo loĝis tiam 70 familioj, kiuj konstruis sian unuan sinagogon en la jaro 1163.

La aŭtoro trovas certajn influojn de Judoj, kiuj atingis tiun regionon kelkcent jarojn antaŭ la Kristo. La legendo pri "dek triboj", kiuj venis al centra Azio aĝas 2600 jarojn. La strebo de tiuj homoj al la rekonstruo kaj feliĉo, kiu venos en estonteco per "Maŝiah" influis ankaŭ la ĉirkaŭantajn popolojn.

La aŭtoro estis surprizita, trovinte la sespintan stelon (Magen David) sur la sankta tombo de Isa. Tie okazas ĉiujare rita ceremonio komence de la jaro, laŭ la hebrea kalendaro (septembro--oktobro). Li trovis ankaŭ samajn stelojn sur kelkcent ŝtonaj lanternoj antaŭ la sanktejo ISA. En alia distrikto Kurioĝi, ankoraŭ vivas idoj de Ata tribo, kiuj ĝis nun ne asimiliĝis. Iliaj domoj diferenciĝas de la japanaj domoj. Ĉe ilia fronto estas puto nomata "Isarai", kio signifas: israela puto. Proksime de ĝi estas sankta loko nomata "David". La aŭtoro trovis signojn de moroj kaj kutimoj, kiuj -li opinias- postrestis de la judaj festoj (Hanuka, Purim). Ĝis la dua mondmilito estis kutimo an Japanujo donaci al novnaskita filo blankan kimonojn kaj al filino ruĝan. Por ke ĝi alportu feliĉon, oni surkudris sur ĝi la sespintan stelon.

Lasttempe malfortiĝis la kredo de la Jahadanoj, sed la Mokojanoj preĝas pri "reveno al la fonto" kaj ili citas la vortojn de la profeto Amos: "Tiun tagon mi restarigos la falintan tabernaklon de David". Prof. Taŝima titolas unu ĉapitron en sia libro per vortoj: "Ni amas Israelon". Centoj de Makoja -sektanoj vizitas kaj vizitis Israelon.

Ŝ. N.

ISRAELA RADIA AMATORA STACIO

Unu de niaj samideanoj, s-ro Avraham (Rami) Ŝlain, radioamatoro komencis antaŭ unu jaro serĉi esperantajn kontaktojn kun eksterlando. (Antaŭe li faris tion en angla kaj hebrea lingvo). Li sukcesis jam paroli kun samideanoj en Francio, Nederlando, Britio, Hungario, Germanio kaj kun sovetano malgraŭ tiea malpermeso paroli kun Israelo.

La nomsigno de stacio estas 4Z4LX. La stacio regule laboras sabate tagmeze kaj de tempo al tempo vespere en aliaj tagoj de la semajno.

La plej oftajn kontaktojn li havis kun s-anino Renata de Ageno en Francio, patrino de 4 infanoj (tri-

ĝemeloj kaj unu) kaj amiko Rudi de Norda Germanujo DL2ZO, 67 jara esperantisto (de la jaro 1918).

La israela stacio invitas radioamatorojn serĉi kontaktojn kun ĝi kutime sabate je la 12-a horo universala tempo (GMT) ĉe 21300 ± 5kc, aŭ 12-a kaj duono U.T. frekvenco 14200 ± 5kc. Se la tempo kaj frekvenco ne konvenas bonvolu skribi kaj proponi aliajn. (Adreso: Rami 36242 P.O.B. Tel Aviv, Israel). Eblas ankaŭ serĉi kontakton per radio al ĉiu israela radioamatoro plej facile per la angla lingvo kaj peti lin telefoni al 03-202722 por inviti la solan ĝis nun israelan stacion en la eter-ondoj. Esperantoj, ĵurnaloj estas petataj kopii la sciigon.

UZO DE ESPERANTO EN LA KOMERCA REKLAMO

En la lasta numero de la "Israela Esperantisto" aperis informo pri eldono en Israelo esperantlingvan broŝureton el 6 multkoloraj bildkartoj kun reklamo por eksporto de israela avokado.

Ĉiu esperantisto povas ricevi ĝin senpage ĉe p.k. 33147 Tel Aviv, oni petas nur aldoni poŝtmarkon por poŝtelspezoj. Bildkartoj de tiu ĉi reklamilo povas esti uzataj, kiel ĉiu alia bildkarto kun aldonado de salutoj kaj aliaj vortoj. Ĝi estas la unua komerca eldonaĵo en Israelo en internacia lingvo. Estas dezirinde, ke samideanoj subtenu tiun entreprenon, ĉar se ĝi sukcesos, povos ankaŭ sukcesi antaŭenigi nian movadon en komerco.

Ĝis nun venis nur 16 leteroj kun peto ricevi tiujn bildkartojn, tio senluziigis la eldoniston. La apatio de niaj samideanoj malhelpas evolui tiun plej efikan vojon por subteni nian movadon. Krom tio, ĝi ankaŭ malutilas al esperantistoj mem, kiuj povas uzi senpagajn bildkartojn por sendi ilin eksterlanden.

Se ĉiu de niaj samideanoj forsendos nur unu kajejon, ĝi helpos al nia movado al reklamo por israelaj fruktoj kaj per tio al nia komerca bilanco.

Ankaŭ eksterlandanoj povas ricevi s.n. reklamilon sendante peton kun aldonado de internacia poŝtmarko.

Por eksterlandanoj, kiuj ne konas avokadon kaj ne posedas PIV! Avokado estas granda ovala bongusta frukto. (Persea gratissima lat.)

Josef Šemer

SCIIGOJ KAJ KOMUNIKOJ

S-ano Löwenkopf en kibuco Maagan invitas eksterlandajn kaj enlandajn samideanojn viziti lin en kibuco Maagan ĉe la lago Kineret (Genezareto). Eksterlandanoj, kiuj volas labori en kibuco kelkajn horojn dum la tago, povas resti longan tempon post antaŭa kontakto kun samideano Löwenkopf.

S-ano Moŝe Savir Jerusalemo gvidis ĉi jare 2 kursojn en Kiriat Noar. Finis la kursojn: Riĥter Šaj, Amir Becalel, Feldman Ĥaim, Ovadia Igal, David Ezra, Amar Eli-ezer, Kamil Zeev, Samaj Joram, Lejboviĉ Israel, Goldŝtajn Moŝe, Fezer David.

S-ano M. Savir presigis por instruado eltiraĵon de Biblio en 500 ekzempleroj. Aĉetebla ĉe M. Savir, Jerusalemo, Ejn Kerem, Jefe Nof 25.

Lernolibro Turno- Maŝler dua eldono elĉerpiĝis kaj tuj estis eldonita tria eldono, parte plibonigita, de sama libro. La libro estas aĉetebla ĉe s-ano Maŝler T-A. 64 041, Hapardes str. 11., prezo kun poŝtelspezoj 6 lirojn.

S-ano Ĥ. Rusak, Jerusalemo, str. Boroĥov 18 eldonis la duan kaj la lastan volumon de "Enciklopedia vortaro Esperanto-jida". Aĉetebla ĉe aŭtoro.

vizitis nian landon kaj partoprenis la Landan Konferencon Stefan Shenfield el Londono.

La komenca kurso en Tel Aviv finigis per sukcesa okzameno. Finis la kurson gelernantoj: Borenŝtajn Dov, Epŝtajn Jehudit, Isakov Ĵak, Karmel Nava, Ŝapira Ĥaim, Ŝorŝan Ŝmuel, Teri Edna, Vandel Amri, Zalcer Rut.

La 6-an de Junio vizitis nian klubojn d-ro E. James Lieberman, instruisto de vaŝingtona universitato pri planado de familio. Li prelegis tre interese pri sia fako.

D-ro maŝler skribis protestan leteron al UEA pro reeldono de Venecia Komercisto.

GRATULOJ

Ni gratulas al s-ano Aŝer Ron pro la edziĝo de lia filo (vundita dum la milito kaj resaniĝita.) Multajn feliĉajn jarojn por gepatroj kaj gefiloj!

Ni gratulas al s-ano J. Giladi pro la edziniĝo de lia filino kaj samideanino. Longajn feliĉajn jarojn al la tuta familio! Deziras ELI kaj JELI.

ELI gratulas al s-anino Tamiko -Japanino, kiu iam vizitis nin en Israelo pro ŝia edziniĝo kun Norvego Nielsen. Tamiko ne forgesis nin kaj sendis al ni fotografiaĵojn de ŝia solena festo.

VOLAS KORESPONDI

Andreo Marszałkowski P.K.254. PL 80-958 Gdańsk -I Polio -Polska. Interesiĝas pri poŝtkartoj, bildkartoj pri historio de Israelo. Li tradukas libron Ŝmuel el Biblio.

Komencanto Kare Jensen, Strandgt 21 -Skien, 3700 Norvegujo. Kolektas poŝtmarkojn.

Matthes, 68 Mannheim -s, 10 Sandgewann Germanio,

Beleznai János, H-2800 Tatabánya, Gyori u. 16. Hungario. 28 jara, interesiĝas pri Israelo. Finis gimnazion, konas multajn lingvojn.

Jean Pierre Coignet, Esp. Grupo M.J.C. 2 Avenue Foch 76600 Le Havre, Francio. 30 jara, juvelisto, filatelisto.

Móczár Sándor, Kiskunfelegyházam. Postafik:31 Hungario, 44-jara viro, kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

40 geknaboj kaj fraŭlinoj, tre lertaj lernantoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Bonvolu skribi al instruisto: Rodolfo Canet, Str. Quintana, 12-30 Alicante (Hispanio)

0 0 0 0 0 0

NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

LETERO DE RUMANIO

La enhavo de "Israela Esperantisto" estas interesa kaj valorap por nia ĝusta informado en multaj problemoj. Pluajn sukcesojn.

Nomo kaj adreso konata en redakcio.

"Knittelfeld -Aŭstrio, 7.3.1974

Karaj Samideanoj!

Ĉar vi bonvolis ĝojigi min per kelkaj kajeroj de via ekstere modesta, tamen multrilate kun bonega enhavo, organo "Israela Esperantisto", mi deziras ĝin aboni por plue ĝui ĝin kaj la klarigojn pri via lando. La kontribuajon "Sinaĵo" kaj "Morto de Sanktulinoj" mi tradukis kaj sendis al mialandaj ĵurnaloj kaj semajngazeto por represado...

Sincere dezirante al via heroaro kaj suferantaro ĉian pravan bonŝancon, mi salutas vin tre kore

Em. Rechtsanwalt Dr. Adolf Halbedl. Schittstr. 17

AL NIAJ ABONANTOJ

Redakcio petas perdonon de niaj abonantoj, kiuj pagis por aerpoŝta forsendado de nia revuo, ke ili de venonta numero ricevos ĝin per marpoŝto, ĉar la poŝtelspezoj tiel pli grandigis, ke ni ne eblas en forsendado aerpoŝte. Por ne kaŭzi la perdon al tiuj, kiuj jam pagis ni plilongigos sendadon ĝis elspezoj kovros la pagon jam faritan. Por estonte ni ne povas akcepti pagon por aerpoŝtforsendado.

 האספרנטיסט הישראלי

 בטאון הליגה לאספרנטו בישראל
 תל-אביב ת.ד. 39004

 חוברת 51 - יוני 1974 - בעריכת אלכסנדר מנור

E N H A V O

La landa konferenco de ELI kaj JELI	1
Zamenhof estis hebreo	4
Aleksander Zilbernik-unua mecenato de Esperanto	4 A. Holzhaus
Esperanto kaj la internaciaj kongresoj	5 " "
La araba imperialismo	6 J. Semer
La murdo de infanoj	6 D.M.
La homaj rajtoj de Judoj en Sirio	7 A.M.
Internacia Babelturo	8
La kvina ĉefministro de Israelo	8
Ichak Rabin	8
Publikaj leteroj	9
<u>Recenzo</u>	
La rajdado kiel moderna terapio de la medicino	
Israelaj vidindaĵoj	11 H.M.
La malnova urbo en Jerusalemo	
Poeziaĵoj	12 H. Mašler
Esperanto la lingvo por ni	
La belaj revoj	13 J. Giladi
Japanaj sektoj de la juda deveno	13 " "
Israela radia amatora stacio	14 Š.N.
Uzo de Esperanto en la komerca reklamo	15 Rami
Sciigoj kaj komunikoj	16 J. Semer
Gratuloj	17
volas korespondi	17
Niaj legantoj skribas	18
	18

Redakta komisiono
 ĉefred. A. Manor
 J. Giladi.
 D. Wunderbaum